Alia surprizo okazis je la fino de la koncerto kiam oficistino de la gubernio Västmanland diris frazon en Esperanto celante la signifon de tia koncerto per neŭtrala lingvo kunigi enmigrantgrupojn en la gubernio al multkultura socio. Ŝi ankaŭ rekomendis lerni Esperanton kaj anoncis sin kiel membro de la klubo.

Post la koncerto multaj de ni restis en la sidejo por bufedumi, babilu kaj gratuli la tridekjarulon, almenaŭ la reprezentanton de la klubo en Västerås. Dag Celsing restis ĝis la fino kaj parolis kun kelkaj samideanoj. Almenaŭ 18 de ili venis al Västerås de longe for i.a. de Sundsvall kaj Karlskoga.

La kutima koncertrezencanto de VLT tre favore "kritikis" la koncerton en nekutimlonga artikolo.

Ankaŭ aperis "antaŭartikolo" en la hejmpaĝo "Esperanto Britain" (angle) de Ian Fantom de la Londona Klubo Nia "ŝika" programfolio dulingve, donis krom la titoloj de la kantoj kaj muzikaĵoj, ankaŭ pli ĝeneralaj informoj.

Fine, mi volas sugestii al vi, muzikemulo, se vi volas ion organizi tiurilate, turnu vin al mi, kaj mi provos denove en Västerås kompreneble!

Wim Posthuma

SÖK STIPENDIUM

Nu har de av er som är medlemmar i SEJU möjlighet att söka Märta Andréassons stipendium! Stipendiet delas ut till ungdomar för resor till olika esperantoarrangemang. En beskrivning av stipendiet och anvisningar om ansökan finns på SEJU:s hemsida (<http://www.tejo.org/seju>). Ansökningarna ska vara SEJU tillhanda senast den 30 april. Lycka till! Amike, Daniel Granello, ordförande i SEJU

Mia unua internacia junulara esperantorenkontiĝo

La Märthastipendiulo de 2003 rakontas

En 2003 Carl Mäsak gajnis la Märthastipendion. Dum novembro en la pasinta jaro Carl vizitis OKEJ/MEJK en Söjtör en Hungario. OKEJ/MEJK estas kununuigo de du eŭropaj junularaj renkontiĝoj: OKEJ (Okcidenteuropa Konferenco de la Esperanto-Junularoj) kaj MEJK (MezEuropa Junulara Konferenco).

Estis la unua fojo kiam Carl havis la eblecon uzi Esperanton en internacia medio. Nuntempe Carl estas vizprezidanto de SEJU.

Post kelkaj danĝeraj aventuroj survoje tien, atingis mi Budapeŝton. Mi trovis la renkontiĝlokon senprobleme - estis la oficejo de la urba esperanta asocio. Enirante tien, du hungaraj geesperantistoj, kiuj ŝajnis ĝentilaj kaj amikaj, tuj salutis min. Ne longe daŭris antaŭ ol alvenis aliaj gevojaĝantoj, de Germanio kaj Aŭstrio. Ĉiuj salutis unu la alian, post kio foriris ni buse al Söjtör, eta vilaĝo ekster Zalaegerszeg, proksimume 200 km sude de Budapeŝto.

En la buso, mi havis bonŝancon: apud mi estis unu el la hungaraj geesperantistoj, afabla mezaĝa virino, kaj ekparoladis ni Esperante... Ĉi tio estis, malgraŭ ĉio, mia unua internacia junulara esperantorenkontiĝo, kaj por mi estis bonege ebli uzi Esperanton en internacia medio. Fleksante miajn surprizitajn Esperanto-muskolojn dum la interparolo, mi antaŭguis, sed ankaŭ iom maltrankviligis min la penso paroli Esperanton kvin tagojn.

La konstruaĵo en Söjtör estis ĉio kion oni povis peti. Veraj litoj nin atendis en unu el la ĉambroj; ni havis kaj duŝejojn kaj banĉambrojn, kaj eĉ propran kuiriston. Ĝoje mi konstatis ke mi trovis miajn samtipulojn (kaj tion sperton mi havas senproporcie ofte en la Esperanta komunumo). Es-

tis tie gejunuloj de preskaŭ ĉiu parto de Eŭropo: Germanio, Aŭstrio, Slovakio, Italio, Norvegio kaj Francio.

Tio, kio sekvis dum la postaj tagoj, por ĉiam restos en la memoro kiel la lasta okej-mejk-renkontiĝo (kaj la unua tejk-renkontiĝo). Krom la kutimaj kunsidoj kaj prelegoj, kaj kompreneble bona manĝo, estis tie multaj aliaj aktivecoj, ekzemple gvidita promeno tra Söjtör. La etoso en la grupo estis ege positiva. Baldaŭ ni nin sentis kiel teamon kaj ni neniam volis apartiĝi unu de la alia.

Mi plejparte restis ĉe la virta pado kaj krokodilis nur de tempo al tempo kun la alia svedparolanta persono tie. Sed mia konfido je la parolata Esperanto sendube kreskis dum la renkontiĝo.

Tiel pasis la tagoj en Hungario. Mi povas nur diri ke mi ĝojas pro tio ke mi faris la vojaĝon. Tio ĉi ne estus ebla, aŭ almenaŭ ne tiel facila por mi, sen la apogo de la sveda Märthafonduso, kies celo estas subteni junajn svedajn esperantistojn kiuj volas vojaĝi kaj renkonti aliajn junajn esperantistojn. Mi forte rekomendas al ĉiuj kiuj pripensadas similan vojaĝon dum 2004: petskribu al la ĉiujara fonduso.

Apartiĝante de la aliaj samrenkontiĝantoj, ni promesis unu la alian ke ni rerenkontiĝos denove kiel baldaŭ tiel permesos la cirkonstancoj. Vojaĝante hejmen, mi pensis ke mi havis multajn dankindajn spertojn el Hungario. Krome mi gajnis multajn novajn geamikojn de ĉie en Eŭropo, mi sentis min, por la unua fojo, kvazaŭ vera esperantoparolanto. En la aviadilo hejmen, mi rifuzis paroli ian alian ol Esperanton kun la kunpasaĝeroj!

Carl Mäsak
vizprezidanto de SEJU

Stöd Märthafonden!

Ofta kan ett internationellt esperantomöte göra att man stannar och aktiverar sig i esperantorörelsen. Märthastipendiet syftar till att uppmuntra ungdomar att åka på esperantoträffar runt om i världen. Om Du känner att detta är viktigt och vill bidra med pengar, så går det bra att skänka medel till Märthafonden. Sätt i så fall in pengar på SEJU:s postgirokonto: **513301-2** och meddela oss att det ska gå till Märthafonden. SEJU tackar på förhand för alla bidrag! Som ni kan se i Carl berättelse, gör de stor nytta!

SEJU:s årsmöte

SEJU kommer att hålla sitt årsmöte under Kristihimmelsfärdshelgen i Lesjöfors! Alla SEJU:s medlemmar hälsas hjärtligt välkomna! Vid årsmötet kommer vi bland annat att välja styrelse för det kommande verksamhetsåret samt diskutera framtiden för SEJU. Om du vill aktivera dig i SEJU:s styrelse så kan du kandidera under årsmötet. Kan du inte närvara går det likväl att kandidera, genom att skicka en presentation av dig själv till seju@esperanto.se. Glöm inte att ange vilken post du vill kandidera till. Till samma adress ställs även stadgelsesändringsförslag och övriga frågor som önskas ta upp på årsmötet. Dagordning för årsmötet och övrig information kommer att finnas på vår hemsida (<http://www.tejo.org/seju/>) inom kort.

Under Kristihimmelsfärdshelgen tänkte vi även passa på att ha lajbans tillsammans! Därför vore det roligt om så många som möjligt kunde dyka upp! Kontakta oss gärna om du undrar hur man kommer till Lesjöfors eller vill ha sällskap på vägen dit.

Vid intresse tänkte vi även hålla en esperantokurs för ungdomar. Om du är intresserad, skriv då till seju@esperanto.se och anmäl ditt intresse.

Vi ses i Lesjöfors!

Daniel Granello
ordförande i SEJU

Nia sveda sanktulino sankta Birgitta

En tiu ĉi La Espero sub la rubriko Temo vi trovos du malsamajn artikolojn, tamen ne tute malsamajn, ĉar la unua pri Sankta Birgitta, kies unuan parton vi povos legi tie ĉi, unuloke mencias bordelojn. Tiun temon pli vaste traktas la dua artikolo.

Diverstemaj artikoloj daŭre estos bonvenaj al "Temo".

Oni ne komprenas Birgittan, se oni ne sciis, ke ŝi apartenis al kaj estis stampita de la sveda sinjora klaso, kiu jam sub la reĝo Magnus Ladulås formiĝis al edukita monda nobelaro.

La tuta parenkaro en fora pasinteco estis juĝistoj. La patro donis grandajn donacojn al piaj institucioj, mem li estis grandege riĉa. La patrino devenis de la fame konata nacia reĝa dinastio kaj estis parenca al la reĝa familio.

Birgitta naskiĝis dum la printempo en 1303. La patrino de Birgitta mortis en 1314, do Birgitta nur dum 11 jaroj konis kaj vivis kune kun sia patrino. Ŝi estis severa, pia kaj altranga virino. Kiam la patrino de Birgitta akcidente falis en la lagon – ŝi tiam estis graveda – la duko Erik troviĝis en la apudeco kaj savis ŝin. La gepatroj de Birgitta estas entombigitaj en la katedralo de Uppsala.

Kiam la patrino de Birgitta mortis, la patro translokis ŝin al la biendomo de Aspanås, apud la lago Sommen, kie lia bofrato kaj kolego de provinca leĝisto Knut Jonsson loĝis. Kiam Birgitta venas al Aspanås, ŝia onklo funkcias kiel kanceliero de la reĝo.

De Aspanås Birgitta translokiĝis al Ulfåsa pro la geedziĝo kun la dekokjara Ulf Gudmarsson. Ulfåsa iutempe apartenis al la patro de Birger Jarl.

Katarina, filino de Birgitta, rakontas kion ŝi aŭdis de sia patrino, ke ŝi plej volonte deziris vivi kiel virgulino kaj servi Dion sen edziĝi.

Birgitta ricevis kun sia edzo ok infanojn. Katarina edziniĝis, kio povas esti surprizita, kiam oni konas sian grandiozan evoluadon kiel la heredantino de Birgitta. La filo Birger iĝis leĝisto kiel sia patro. Li estis pia viro.

Ulf rapide avancis, en la unua vico pro parencaj kontaktoj.

En 1339 li estis membro de la konsilistaro de la reĝo Magnus Eriksson. En kunligo kun liaj pli intimaj rilatoj kun la reĝo ankaŭ Birgitta povis deĵori kiel ĉefo de ceremonioj ĉe la kortego.

Nobla virino, kiu iĝis la bopatrino de Karl, la filo de Birgitta, Ingeborg Eriksdotter, rakontis, ke ŝi aŭdis pri la severa kaj pia vivo en Ulfåsa. Ŝi konstatis, ke Birgitta dediĉis grandan parton de sia vivo al malsanulejo, kiun ŝi fondis en la bieno kaj ke ŝi persone flegis la malsanajn homojn kaj ne fortiriĝis de mallogaj malsanoj kaj flegistinaj taskoj. Tiu kondukis al tia admiro kaj amikeco, ke ŝi sekvis Birgittan al Romo kaj restis tie kvin jarojn.

Birgitta ankaŭ serĉis la defalintajn

knabinojn en iliaj bordeloj kaj sukcesis per admonoj kaj persvadoj igi ilin sekvi al Ulfåsa, kie ŝi lasis ilin loĝi en aparta gastejo.

La edzo de Birgitta farmis la grandegan nacian reĝan dinastipalacon en Vadstena, la plej grandioza ekster Stockholm, kiu poste devus enteni la monaĥinan ejon. Birgitta estis ege riĉa. Ŝi estis fiera kaj potenca kastela virino, kiu donis ordonojn al granda stabo de geservistoj. Birgitta estis ĉirkaŭfermata de leĝistoj kaj reĝaj konsilistoj.

Pilgrimvojaĝoj

Birgitta iris piede 1339 dum 30 tagoj de Ulfåsa al Trondheim. Ŝi povus rajdi, sed preferis piediri. Nobla gesinjoro kiel Birgitta kaj ĝia edzo ne veturis solaj. Ili havis geservantojn. Pastro kunsekvis.

Ili ankaŭ faris pilgriman veturadon al la tombo de Sankt Jakob en Compostella en la nordokcidenta Hispanio 1342. Ulf mortis 1346 en la monaĥejo de Alvastra, sude de Vadstena.

La forpaso de la edzo

Ni scias nenion pri la malsano de Ulf. Li estis ŝanĝita kaj profundiĝis dum siaj lastaj vivjaroj, verŝajne sub fortaj impresoj de sia edzino.

La filino Katarina rakontas, ke estis la intenco ne nur iri en monaĥejon sed mem konstrui novan monaĥejon. La morto malhelpis al la patro plenumi sian promeson.

Birgitta kaj ŝia edzo estis ege riĉaj. La infanoj ricevis laŭ la leĝo siajn porciojn da heredaĵoj. La plej maljuna filo ekloĝis en Ulfvåsa. Iom post iom li iĝis kiel sia patro leĝisto en Närke. Birgitta havis multajn viziojn. Ŝi sciis, ke ŝi estis elektita ricevi ĉielajn mesaĝojn. Kiam ŝia Ulf mortis, ŝi fortiriĝis al filia konstruaĵo de la monaĥejo de Alvastra.

En la biografio de Birgitta, Katarina skribis, ke ŝi ravigis en la spirito kaj vidis helan nubon kaj en ŝi viran aperaĵon, kiu diris: "Virino, aŭdu min! Mi estas via Dio, kiu volas paroli al vi. Ne timu, ĉar mi estas la Kreinto. Mi ne parolas kun vi por vi sed por la savo de aliaj homoj."

Kiam ŝi ricevis sian definitivan revelacion fondi novan monaĥejon, io okazas, kio certe surprizis ŝin, kvankam ŝi fidele kredis je sia alvokiĝo. Magnus donacas sian reĝan kastelon Vadstena al ŝia estonta monaĥeja institucio. Li scias, ke ŝi ricevis sian revelacion en Vadstena, en la kapelo de

la kastelo.

Birgitta kaj la monda politiko

Rimarkinda parto de nia eksterlanda komerco iris al aŭ trans Flandrujo.

Stockholm estis hansa urbo kaj membro de tiel nomata Bruĝo-kompanio. En Bruĝo la sveda kupro trovis sian vendadon.

Birgitta supozis, ke ĝi povos produktigi la papon kaj igi la batalantajn reĝojn fari pacon.

Ŝi apartenis al politike gvidanta sfero kaj la sociaj korifeoj. Ŝi estis sperta politikisto, kiu ekstere kaj interne konis la svedan reĝan paron kaj la reĝan politikon. Ŝi havis grandan intereson por la justeco – svarmis leĝistoj en ŝia parenkaro.

Ĉiuj estis konvinkitaj, ke Birgitta estis la proparolanto de Dio – ne parolis en sia propra sed en la nomo de Dio.

Birgitta kiel aŭtoro

La tiam tempo certe sufiĉe facile renkonis kiujn episkopojn Birgitta publike atakis – ofte ŝi aludis pri aktualaj skandaloj kaj ekleziaj disputoj. Ŝi atakas kaj malkaŝas personojn, kiujn oni rigardas kiel perfidajn aŭ falsajn.

El ŝiaj meditadoj venis tuta libro, certagrade ŝia plej surpriza kaj rimarkebla libro, la tiel nomata "La libro de la demandoj". La tiam tempo bone aŭskultis al la priskriboj de Birgitta.

La vojaĝo al Romo

Birgitta sciis, ke ŝi en Romo povos renkonti la papon kaj la imperiestron. Birgitta forlasas Svedion por ĉiam. Krom la pastroj troviĝis en la vojaĝo Magnus Petri, kiu ludis tre gravan rolon en la vivo de Birgitta. Li iĝis monaĥeja frato. Krom la nomitaj kunsekvis geservistoj.

En vizio estas skribita: "Kristo parolas al sia fianĉino, kiam ŝi estis en Alvastra kaj diris: Iru al Romo kaj restu tie, ĝis vi ekvidos la papon kaj la imperiestron, kaj parolu en la nomo de Dio al ili tiujn vortojn, kiujn mi diras al vi."

1350 estis jubilea jaro. Pilgrimoj de la tuta Europo alfluis al Romo. Birgitta ricevis loĝejon en palaco, kiu estis eĉ kunkonstruita kun la preĝejo San Lorenzo in Damaso.

La dezertigo de la pesto tuj antaŭ la alveno de Birgitta frapis la landon kun teruro.

Ĉie la pesto estis rigardata kiel puno pro morala disfalo kaj dekadenco de la moro. Birgitta havas la saman opinion kiel la kuracistoj de la

tempo kaj la klerikaro. La bildo de la lasta juĝo iĝas pli ĝenerala.

Kelkaj el la timigaĵoj de Birgitta estas evidente inspiritaj de la Biblio, precipe la Apokalipso.

En Milano Birgitta mokis la ĉefepiskopon. Verdire ŝi agis ne nur kuraĝe sed saĝe. La dezertigo de la pesto tuj antaŭ la alveno de Birgitta frapis la landon kun teruro.

Ĉie la pesto estis rigardata kiel puno pro morala disfalo kaj dekadenco de la moro.

Kelkaj el la timigaĵoj de Birgitta estas evidente inspiritaj de la Biblio, precipe la Apokalipso.

La unua tempo en Romo

La preĝejo troviĝis en mizera stato. Helpis malmulte, ke oni provis kovri la ruiniĝon per gobelinoj. Birgitta devis de la unua momento iĝi skuita de tiu stato, en kiu la ĉefa templo de la kristanaro renkontis ĝin. Baldaŭ ŝi ĉie en Romo povos vidi ekzemplojn de pli granda ruiniĝo. La sveda pilgrimanto privilegiĝis kun delikata domo. De sia dormĉambro ŝi povis vidi malsupren al la ĉefaltaro de la preĝejo San Lorenzo in Damaso. Birgitta planis resti nur mallongan tempon en Romo. La papo estis atendata kaj ŝia komisiio kun la konfirmo de la monaĥeja regulo ne povos preni tro longan tempon, tiel evidente la Savanto sin esprimis. Birgitta kaj ŝiaj ĝeamikoj tuj komencis viziti la sanktajn lokojn de la urbo.

La urbo Romo estis sovaĝejo. Neniu povis esti sekura; ĉie oni povis iĝi atakita. Preskaŭ ĉiuj sanktaj lokoj kaj la preĝejoj kuŝis en ruinoj.

Unufoje Birgitta lasas la patrinon de Dio diri: "Romo estas kiel kulturata kampo, super kiu kreskis kardoj. Pro tio ŝi devas unue puriĝi per akra fero, poste puriĝi per fajro kaj poste plugiĝas de paro de bovoj. Mi faros kun vi kiel la kamparano, kiu translokas la plantaĵojn al alia loko. Ĉar al tiu ĉi urbo estos puno preparita, kiel se juĝisto povus diri: senhaŭtigu la tutan haŭton, elprenu ĉiun sangon de la viando, tranĉu ĉiun viandon en pecoj."

Italaj konatuloj diris, ke apenaŭ troviĝas pli rimarkinda kaj pli sekura kristana prijuĝo de la katastrofa spirita situacio de Romo sub la foresto de la papoj. Okaze de la sensencaj internaj bataloj la papoj devis rifuĝi; la preĝejoj perdis siajn tegmentojn kaj pordojn kaj ŝanĝiĝis al sekretejo por homoj kaj hundoj.

Birgitta miksis sin en la batalo pri la franciskanoj. La plej multaj nun havas proprajn, kion ilia regulo ilin ne permesas. Al ili ĝojas plu pri sia kondamninda propraĵo ol super la sankta, glorinda malriĉeco, kiun la majstro Francisko rekomendis.

Patrino kaj filino

La filino de Birgitta, Katarina, estis la kvara infano. La frato Karl mokis ŝian lastan edziĝon kaj volis malebligi ŝian forveturon al Romo por reunui sin kun la patrino. Kiel la patrino ŝi iĝis frue edzinigita pro ordono de la patro. Neniu atentis ŝian revon pri monaĥeja vivo. Pro tio ŝi forlasis sian edzon por veturi al sia patrino en Italio. Nun Katarina decidis resti ĉe sia patrino. La juna Katarina venis al Romo kune kun du virinaj amikinoj kaj neniu malpli ol la marŝalo de la reĝo. Kiam ili venis al la kardinala palaco en Romo, Birgitta ne troviĝis tie. Dum tuta semajno Birgitta kaj ŝiaj ĝeamikoj serĉis. La bona Petrus Olavi sentis, ke li devis reveturi al Romo kaj tie li trovis Katarina.

Birgitta estis en Farfa kaj tie donis al la abato riproĉadon. Li iĝis konvertita al sankta vivo. Kiam Birgitta revenis al Romo, la filino decidis resti ĉe sia patrino.

La patrino de Dio

Birgitta komencas ricevi siajn revelaciojn de Maria. La katolikoj preĝas ĉiutage: "Sankta, Maria, gracioplena. La Sinjoro estas kun vi. Benata vi estas inter la virinoj, kaj benata estas la frukto de via sino, Jesuo."

Klemento VI estis papo 1342 – 1352 sed li havis sian sidejon en Avignon en Francio.

La patrino kaj la filo

La plej amata filo de Birgitta estis Karl Ulfsson. La preĝoj de Birgitta kreis ĉe la filo apartan diotimon kun la sekvo, ke li post peko tuj konfesis sin.

Inicento VI estis papo 1352 – 1362. Birgitta salutis lin kun ĝojo kaj granda atendo. Birgitta frue interesiĝis pri la antaŭdiro pri la alveno de Antikristo. Ŝia sveda instruisto Matthias unufoje demandis ŝin, ĉu ŝi povis informi kiam oni povus atendi la teruran Antikriston.

Arne Lundkvist

Daŭrigo en la venonta numero.

Validas la leĝo, kiu malpermesas aĉeton de seksaj servoj

La leĝo kiu malpermesas aĉeton de seksaj "servoj" akceptita de la parlamento (sveda) en j. 2000 ege gravas kiel normigilo kaj jura marko. Pri tio akordiĝis ekspertoj de la polica kaj jura sistemoj kaj volontulaj organizoj (NRO) kiuj partoprenis en tutaga diskutado pri la seksindustrio.

Je la invito de Europa-parlamentano Marianne Eriksson de Norda Verda Maldekstro. Ĝi frue de 2004 prezentos en la EU-parlamento raporton pri la influo/sekvoj de la seksindustrio en la EU.

Certe oni povas halti la kreskon de la seksindustrio se ekzistas politika volo, sed ĉu tiel vere estas? Kial do oni jure diferencigas inter viroj kiuj aĉetas sekservojn kaj viroj kiuj vendas homojn (virinojn kaj infanojn) al la seksekspluatado?

– Ĉiuj agantoj en la seksindustrio, ek de la varbisto ĝis la kliento formas partojn de la prostitucio. La tuta katenado devas esti prilumita en la jura proceso. Ni komparu kun la komercado de narkotikaĵoj, diris prokuroro Hans Ihrman.

– Tiuj seksaĉetantoj ne agnoskas ke ili partoprenas en organizita grava krimo. Ili ne volas identigi kun la homovendistoj, sed uzante la "servojn" ili fakte subtenas la gravan krimcon.

Multaj virinoj kondukita al Okcidenta Eŭropo per homokontrabandi-

stoj scias, ke ili devas gajni monon por pagi al tiuj agentoj. Do ne estas trafe argumenti pri "altrudita" (kontraŭleĝa) kaj "volonta" (laŭleĝa) prostitucio, kiel kutimiĝas en la plej multaj de la EU-ŝtatoj.

Rakontis Henrik Sjolinder de la ekspertgrupo pri homovendado de la EU-komisiio, ke la nombro de virinoj el Orienta Eŭropo venditaj en Okcidento draste kreskadis. De ili (ilia agento) oni aĉetas "tempon", ne specialan seksan servon. Tio implikas ke la kliento povas agi laŭplaĉe kontraŭ tiuj virinoj. Perforto estas pli regulo ol escepto en tiuj rilatoj kun virinoj el ekster EU, kaj la merkato ŝajnas senlima.

– Nu, se la klientoj sukcesas trovi tiujn virinojn, do ankaŭ la policanoj povu trovi ilin, rimarkis Kajsa Wahlberg, de la Regna kriminala polico, kaj aldonis:


– Kuplu seksskomercon kun terorismo! Kiel tiam agus la potenculoj de EU?

– Necesas nova Plano de Marshall por la orientaj ŝtatoj por ĉesigi la seksindustrion, opiniis Katarina Lindahl, de la Asocio por pri-Seksa Informado (RFSU).

Skribis: Annika Cullberg

(Ruĝaj EU-faktoj, Dec 03., Tradukis Ingvar Enghardt, Esperantoklubo de Stokholmo.)

Esearo multtema



Irmir kaj Reinhard Haupenthal (red.): Esperante kaj ekumene. Festlibro por la 75a naskiĝ-tago de Adolf Burkhardt. 368 p. Edition Ittis, Schliengen, 2004.

Aldoniĝis plia fest-libro, kiu celas honori Esperanto-veteranon per kolektaĵo da artikoloj, kiuj traktas temojn iel rilatajn al la agadkampo de la honoratulo. Adolf Burkhardt dum jardekoj estis prezidanto de Kristana Esperantista Ligo Internacia. Lia plej grava verko estas la diserva libro Adoru, pli frue recenzita en La Espero. Lia vivoverko estas la Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen, unu el la plej grandaj bibliotekoj de la mondo. Li laboris kiel luterana pastro kaj estas edzo kaj patro de tri infanoj. En la biografia skizo oni povas legi i.a. ke en lia 16a naskiĝtago la 10an de Aprilo 1945 pereis kelkaj proksimaj parencoj en la lasta aeratako en lia urbo. Lia patro malaperis dum la milito. Regis kaoso. Jam en 1946 Adolf kun kelkaj amikoj komencis studi Esperanton. La daŭrigon de lia vivhostorio oni legu en la fest-libro.

Post la enkonduko kun biografio sekvas kvar partoj kun dudeko da eseoj. En la parto pri teologio oni povas legi ekzemple pri Esperanto en la servo de la ekumena movado, himno-historio, pri la projekto pri la ekumena himnaro Adoru, pri religia literaturo en Esperanto kaj pri la ekumena koro de Burkhardt.


En la parto pri esperantologio estas i.a. eseoj pri la naskiĝo pri Centro de Dokumentado kaj Esplorado de la Lingvo Internacia (la sola franclingva eseo en cetere tute Esperanta libro), pri la sveda Esperanto-pioniro Otto Zeidlitz, pri la transigo de Germana

Esperanto-Biblioteko al Prusa ŝtata biblioteko en 1936 pro nazia persekutado. En parto pri interlingvistiko ni legas pri la vivo de Johann Martin Schleyer, aŭtoro de volapuko kaj pri Ernst Beermann, alia inventinto de planlingvoj. En la literatur-scianca parto aperas eseoj pri romanista koncepto de ideala kristana pastro, la revuo Horizonto kaj konciza historio de presarto. Fine estas bibliografio de la verkaro de Adolf Burkhardt.

La enhavo de la festlibro, pri kiu mi donis ekzemplojn tie ĉi supre certe estas interesa por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri Esperanto aŭ kaj kristanismo. La libro estas bele presita kaj la enhavo estas bonkvalita. (Pri la du eroj, kiujn verkis la recenzanto juĝu aliaj.) Festlibroj ordinare estas iom kostaj, sed se oni volas plibeligi sian librobreton kaj havi libron por legeti de tempo al alia oni aĉetu ĝin.

Leif Nordenstorm

Movada historio



Ed Borsboom: Vivo de Andreo Cseh. 313 p. Internacia Esperanto-Instituto, Hago, 2003.

Aperis malmultaj biografioj pri konataj esperantistoj. L.L. Zamenhof havas sian. Lia filino Lidia havas sian. Lanti – la fondinto de S.A.T. – havas sian. Nun aldoniĝis biografio pri Andreo Cseh (1895-1979). Cseh naskiĝis en Transilvanio, kiu estis naciece miksitaj regiono. Loĝis tie rumanoj, hungaroj, judoj kaj germanoj. Zamenhof aŭtoris Esperanton en nacie miksitaj regionoj en Polio. Cseh aŭtoris la pedagogian ĉe-metodon en la simile miksitaj regionoj Transilvanio, Cseh,

kiu estis pastro, ricevis la taskon instrui Esperanton al laboristoj en laborista organizaĵo, kaj devis inventi tiun metodon de senlibra instruado, ĉar mankis lernolibroj.

La ĉe-metodo fariĝis tuteŭrope konata metodo de Esperanto-instruado. Malnovaj esperantistoj el Kiruna rakontis al mi ke alvenis ĉe-instruistoj al Kiruna kaj al malgrandaj vilaĝoj dum la 1930-aj jaroj, kaj la instruado estis granda sukceso.

En la libro oni povas legi pri la ĉe-instruado en diversaj landoj kaj pri la fondo de Internacia Esperanto-Instituto en Hago. Oni povas legi pri la "Stokholma puĉo en UEA en 1934" pri la nazia malpermeso de Esperanto en Nederlando kaj pri kiel la kuraĝaj esperantistoj eĉ ĝis 1945 kuraĝis vendi lernolibrojn kaj publike montri la portreton de Zamenhof en librovendejo.

La bele presita libro donas ankaŭ multajn aliajn informojn pri la vivo de Andreo Cseh kaj pri la historio de la Esperanto-movado.

Leif Nordenstorm

Por poeziamantoj



Zivko Ivanović: Antologio de la serba skriba poezio. 238 p. J. Ivanović, Beograd 2002.

Kial paroli pri serba skriba poezio? Ĉar en la serba kulturo la parola poezio ĉiam estis tre grava. Antaŭ dekkelk jaroj aperis antologio pri la parola literaturo, nun pri la skriba. Tiu ĉi antologio kolektas poeziaĵojn ekze Sava Nemanjić, la plej granda poeto de la serba mezepoka literaturo ĝis Matija Bećković (1939-). Mi citu kelkajn liniojn de la laste menciita: Daŭrigo en p. 12.

Om samiska

"Även om det eller de språk man lärt sig som barn alltid blir ens hjärtas språk, kan också språk som man lär sig senare i livet, få en särskild betydelse. För mig har samiskan blivit ett sådant språk, fastän jag var över 25 när jag började studera samiska mer intensivt. Men att jag bestämde mig för att göra det är ett av de bästa beslut jag tagit i livet. Det har gett mig tillgång till världar jag annars aldrig hade kunnat nå och det har lärt mig mycket om språkens möjligheter. Det har fått mig att inse att antalet personer som talar ett språk inte säger något om hur väl man kan uttrycka sig med hjälp av språket. Varje språk, det må – som syd- eller skoltsamiska – talas av några hundra personer, eller av många miljoner, ger möjligheter att uttrycka allt, precis allt."

Håkan Rydving
(I "Det varma milda språket (liegga lnis giella) – en kärleksförklaring till samiskan" i År av liv, Luleå stift 1904-2004.)

På ett liknande sätt känner jag för esperanto.

In

LIBROJ

Daŭrigo el p. 11:

Kosovo-kamparo
Ili forŝtelas mian memoron,
mallongigas la pasinton,
forŝiras la jarcentojn,
moskeigas la preĝejojn,
detruas la alfabeton,
martelas la tombojn,
diserigas la fundamenton
dismetas la lulilon.
(—)



Lappar, la antikristo estis recenzita en La Espero 2004:1. Sten Johansson nomis ĝin la plej valoran libron de la originala Esperanta literaturo. Pro eraro bildo de la libro mankis, sed nun ni aperigas la bildon.

Kiel interpreti tion? Ĉu naciisma poeziaĵo pri la suferado de la serboj. Ĉu porpaca poeziaĵo pri la suferado de ajna popolo en konflikto? Certe ambaŭ respondoj povas esti korektaj. Poezio havas plurajn tavolojn.

En la libro mi kalkulas 36 diversajn poetojn, kiuj verkis eĉ pli multe da poeziaĵoj. Mi dubas ĉu mi vere kompetentus recenzii ĝin. Mi ne legis la serbajn originalaĵojn, sed la tradukoj estas en bona Esperanto, kaj la libro estas bele ilustrita kun interesveka kovrilo.

Mi ĝojas pri la nova libro.

Leif Nordenstorm

Sommarkurser

7-11 juni på Oskarshamns folkhögskola.

Du som är intresserad av olika länder och kulturer, kom till Oskarshamns folkhögskola 7-11 juni 2004 för att få lära dig esperanto.

Lärare på nybörjarkursen: Lars Forsman, Karlskoga (föreståndare för eseprantolinjen vid Karlskoga folkhögskola och författare till många läroböcker i esperanto).

Lärare för fortsättningskursen: Kerstin Rohdin (har översatt Astrid Lindgrens böcker "Bröderna Lejonhjärta" och "Emil i Lönneberga" till esperanto och föreläst på esperanto om Astrid Lindgren i de baltiska länderna, i Polen och i Japan).

Birgitta Elvall, Oskarshamns folkhögskola, är kursledare. Hon ger information om kursen och tar emot anmälningar. Tel. 0491-18958 (hem) och 0491-768100 (skolan). gitt.ekvall@telia.com

oskarshamns.folkhogskola@folkbildning.net

bir.ekv.osk@folkbildning.net

Kostnad: 800 kr, lunch och fika ingår; 1800 kr, dubbelrum med helpension; 2100, enkelrum med helpension.

28 juni - 3 juli på Esperantogården i Lesjöfors

Två av sommarens lärare är också sångare och musiker, kända från internationella turneer och konserter vid de internationella esperantokongresserna, senast i Göteborg i somras.

Efter något års uppehåll återkommer Georgo Handzlik i år som lärare vid sommarkursen i esperanto i Lesjöfors. Han kommer från Polen och har medverkat av och till sedan 1980-talet, då sommarkurserna hölls vid Karlskoga folkhögskola.

Årets kurs är den 18:e, utan uppehåll.

Georgo Handzlik är inte bara en enastående språklärare, han är också trubaduren som sjunger egna visor till gitarr. Han bidrar därmed också till att på kvällarna förmedla en rik esperantokultur till både nya och gamla esperantister.

Vid lektionssalen intill Georgos undervisar en annan lärare i toppklass, Natasha Bertse. Hon är ryska, numera bosatt med familjen i Sverige. Även hon är sångare och gitarrist och hon använder på sitt unika sätt sången i språkundervisningen. Och självfallet underhåller också hon på kvällarna.

Som vanligt blir det undervisning på alla stadier, från nybörjare till konversation för dem som redan talar det internationella språket flytande. Även barn, från fyraårsåldern till tonåren är välkomna. Vid behov blir det mer än en barngrupp. Arrangörerna glädjer sig åt att det redan finns barn som efter några somrar på Esperanto-Gården – och i sanningens namn med stöd hemma dessemellan – nu talar esperanto flytande.

Det händer att större barn kommit ensamma, men vanligare är att också föräldrar kommer och deltar i sin språkgrupp. Något som uppskattats av alla som provat på det är att far- eller morföräldrar har en gemensam semestervecka med barnbarn på kursgården.

Kurspriser från 2690,- flerbäddsrums från måndag morgon till lördag frukost. Barn upp till 12 år 1/2 priset. Extra övernattning 27 juni och 3 juli till specialpris. Prospekt kan beställas på telefon 0590 – 309 09, fax 0590 -303 59 eller egarden@esperanto.se

Ytterligare information och anmälan, telefon: 0590-309 09.

12 juli - 16 juli på Knappekulla, Lerum

(Där 2003 års barnkongress ägde rum.)

Fem dagar: måndag 12 juli kl. 13 till fredag 16 juli kl. 13

Nybörjare, fortsättningsgrupp, konversations-/skrivargrupp

Lärare: Lars Forsman, Christer Lörmemark och andra.

Vandrarrhemsstandard, vacker natur och egen badstrand.

För kurs, logi och mat: 1 500 kr.

V.g. sätt in pengarna på postgiro 43612-1 (E-Societo, Gbg) och skriv namn, adress, tel.nummer och e-mailadress.

Meddela också önskad kursnivå och ev. vegetarisk kost.

Eller kontakta: Siv Burell siv.burell@telia.com, Lekstorpssvägen 46 E, 443 41 GRÄBO, 0302-411 49 (kvällstid)

Arrangör: Esperanto-Societo de Gotenburgo